[H. Salokannel.]

# Bonvenon al Finnlando,

la lando de sporto, 60,000 idealaj lagoj oportunaj por fiŝkaptado kaj kanotekskursoj, 80,000 insuloj, 700 akvofaloj, mirinde helaj senombraj somernoktoj kaj grandegaj arbaroj konvenaj por ĉasado kaj tendarvivado.



Panoramo pri Uusikaupunki

1936

## Nia Gvidfolieto

prezentas al eksterlandano unu el la plej belaj kaj pacaj marbordaj urbetoj de Finnlando, urbon

## Uusikaupunki

(svede Nystad).

Ĝi situas bele ĉe la longa golfo de Ostrobotnia Maro kaj havas 4,000 enloĝantojn. Oni parolas finne, svede kaj kelkaj jam Esperanton. La urbo estas konata pri siaj »belaj pordegoj, romantikaj ventmuelejoj kaj imponaj granitŝtonegoj«.

Malnova preĝejo



Lago Ruokolanjärvi



Uusikaupunki (esperante Novurbo) estas fondita de la fama sveda reĝo Gustaf Adolf II je la jaro 1617. Poste ĝi estis la ĉefurbo de graflando Vasaborg, kie estris lia filo. Sian famon kaj riĉecon la urbo akiris ĉefe per farado de lignaj ujoj, eksportitaj grandskale eksterlanden kaj per vigla navigado per granda velŝiparo. Nuntempe ĝi kun sia ĉirkaŭaĵo estas la plej grava centro de la ŝtonindustrio en Finnlando. Ties bela, blankogriza granito estas preskaŭ ĉiutage eksportata eĉ ĝis Anglujo kaj Ameriko.

Eksterlandano alvenas kutime al Finnlando per vaporŝipo al la estinta ĉefurbo Turku (Åbo). Rigardinte ties historie famajn, antikvajn kastelon kaj katedralon li veturas al nia urbo, 65 km nordokcidenten. La trajnoj foriras de Turku kutime: 5.55, 12.00, 16.30 kaj 19.00. La aŭtoj de la komerca placo: 9.00, 13.00 kaj 18.00. Vaporŝipo veturas unufoje semajne tra ĉarma insularo. La fervoja bileto en III kl. kostas ire kaj reire nur 28 Fmk.

La esperantistoj en nia lando gvidas eksterlandanon kutime senpage, sed la ekstrajn elspezojn oni pagu al la gvidanto. Vin gvidas en Uusikaupunki licea lektoro *J. O. Saarinen* kaj staciestro *H. Salokannel,* loĝantaj proksime de la stacidomo; en Kalanti paroĥestro *P. O. Ekko.*

ĈEFVIDINDAĴOJ: Kulturhistoria muzeo en estinta preĝejo, konata precipe pri siaj en Finnlando unuranguaj lignaj ujoj kaj navigmaterialo. La muzeo estas somere malfermata dimanĉe 13—16 kaj alitempe laŭ interkonsento kun la pordistino Maria Stenros, Mäyhälänkatu 6, telef. 190. Eksperto, redaktoro F. M. Karrakoski estas renkontebla en Kalanti per telef. — Ĉe la norda rando de urbo staras sur roko 4 romantikaj ventmuelejoj kiel rememoraĵo pri la pasintaj tempoj. Iniciato je estonta subĉiela muzeo. — Pompa domego de la distrikta malsanulejo por spirite malsanuloj. — Antikvaj maristaj dometoj de la 18:a jarcento en Baltzarborg kaj Blasieholm. — Multaj belaj pordegoj, ornamitaj domoj, kvin parketoj kaj transversaj bulvardoj, kiuj somere igas la urbeton aspekti kiel kontinua verda arbaro. Antaŭ ĉio Vi devas viziti la mirinde belan, centnombran insularon, kiu ĉirkaŭas la urbon je la distanco de pli ol 20 km. (Kirsta, Putsaari, Lepäinen, Lyökki ktp. Motorboaton havigas afable komercisto J. E. Tervanen).

INDUSTRIAJ ESTABLAĴOJ (Mallongigoj: Ukp. = Uusikaupunki, Oy = akcia societo): Lanaĵfabrikejo Ukp. Villatavaratehdas Oy; ŝtrumpfabrikejo Länsi-Suomen Sukka Oy; tanejo Ukp. Nahkatehdas Oy; kahelfabrikejo Ukp. Kaakelitehdas; ŝip- kaj maŝinfarejo Ukp. Telakka ja Konepaja; boatfarejo Ukp. Veneveistämö; muelilo Vakka-Suomen Mylly Oy.

ŜTONTAJLEJOJ: L. Saaren Kiviliike; Ukp. Graniittiveistämö; The Alberga Granit Export Ltd. Multaj ŝtonminejoj.

TURISMA OFICEJO (7—20.30), poŝto (labortage 8—12, 16—18), telegrafejo kaj ŝtata telefonejo, ĉiuj ĉe la komerca placo.

HOTELOJ: Seurahuone proksime de la stacidomo; Vallila sur la monteto en okcidenta parto de la urbo; malkara gastejo Alppila ĉe Myllykatu 15. — Ĉambraro por ekskursantoj en la dua etaĝo de la urba banejo, Alinenkatu.

FINNA ŜVITBANEJO (= sauna; somere ankaŭ diversaj sanigaj banoj kaj masaĝado riceveblaj). Ĉe la marbordoj bona okazo je refreŝiga naĝado.

KAFEJOJ KAJ RESTORACIOJ: Kafejo de Olga Palmu, Alinenkatu 22; restoracio de Vakka-Suomen Osuusliike, Alinenkatu 19.


RAZISTEJOJ: William Reunanen, Rantakatu 17.

TAJLORAJ FIRMOJ: Ŝtofovendejo kaj Konfekcio de E. A. Koskinen, Alinenkatu 20; tajlora firmo Eino Lehtonen, Liljalaaksonkatu 1.

KOMERCAJ FIRMOJ: Juho Sandell, Pogranda firmo, Alinenkatu 8 (E. parolata); Martti Sandell, Vendejo de Koloniaĵoj, Alinenkatu 8; J. E. Tervanen, Firmo de Koloniaĵoj, Fero kaj Ŝtofaĵoj; Oy. Kandelin, Honkain & Lindqvist, ambaŭ ĉe Koulukatu; Kooperativa firmo Kalantin Osuusliike ĉe la komerca placo; galanterejo kaj paperaĵvendejo de D. Jussila; vendejo de fruktoj kaj viando Lounais-Suomen Osuusteurastamo; Kooperativa Firmo Vakka-Suomen Osuusliike; butiko de koloniaĵoj de Emil Suominen, ĉiuj kvar ĉe Alinenkatu. — Bakejo de Lauri Toivonen (E.parolata).

ĜARDENISTOJ: Karl Olsson; plantejoj de M. N. Kulmala.

AMUZEJOJ: Kinematografejo »Bio Revy«, Alinenkatu 16. — Laborista Teatro.



Eksterhaveno

Ŝtonminejo





Eksterhaveno




Vilaĝa preĝejeto de Untamala

ĈIRKAŬAĴO: La ĉirkaŭaĵo de Ukp. estas historie eble la plej unue konata regiono en tuta Finnlando. Jam dum la katolika tempo ekzistis pluraj vilaĝaj preĝejetoj, el kiuj ankoraŭ restas tiuj de Untamala kaj Soukainen en la najbara paroĥo *Laitila* (20 km). Laitila estas konata kiel la plej grava loko por eksporto de *ovoj* en lando. Tiujn peras ĉefe la tiea kooperativa vendejo *Laitilan Osuuskauppa,* ankaŭ unu el la plej grandaj sur la finna kamparo. Fromaĝon kaj buteron eksportas la tiea buterfarejo *Laitilan Osuusmeijeri.* — Pratempa estas la paroĥo *Kalanti* (9 km orienten), kiun citas jam araba Idrisi ĉ. 1140 kiel grava komerca loko. Ties interesan, m a l n o v a n p r e ĝ e j o n kaj *muzeon* volonte montras paroĥestro *P. O. Ekko.* En la vendejo de pano kaj refreŝigaĵoj de s:ino *Sievä Lehtonen* oni parolas Esperanton.

Cetere, la belan ĉirkaŭaĵon Vi povas rigardi en la bildaro de bonege ilustrita finnlingva gvidfolieto, ricevebla *senpage* ĉe la Turisma Oficejo. La urbo kun sia vastega insularo estas bona ripozejo por la nervoj de ĉiu laca turisto.

La enloĝantoj de la urbo estas honestaj kaj bonvolemaj homoj, kaj la vivado ne estas multekosta, precipe la lupagoj estas konate malkaraj.

**Do, koran bonvenon al Uusikaupunki!**



Eldonis: Esperanto-Societo de Uusikaupunki, 1936.

Presejo de Vakka-Suomi.

kp 872